

Laboristaj Esperanto-Asocioj

SAT-rondoj, Fakoj, Servoj kaj Frakcioj

Laboristaj Esperanto-Asocioj (LEA-oj) celas disvastigi Esperanton en medioj kies celo estas socia progreso kaj vivkvalito, kaj malfermi la vojon al praktika aplikado kadre de SAT.

Aŭstrio : Aŭstria Socialista Ligo Esperantista, Fünfhausgasse 16, AT-1150 Vieno

Britio: Anne Johnson, 42 Beresford Road, Islington, N5 2MZ

Francio : SAT-Amikaro, 134, bd Vincent Auriol, FR-75013 Paris (Ĝenerala Sekretario : Henri Masson, Le Grand Renaudon, FR-85540 Moutiers les Mauxfaits <esperohm@club-internet.fr>.

Germanio : Germana Libera Esperanto-Asocio, p/a Albert Stephan, Renchener Str. 47, DE-77704 Oberkirch

Hispanio : Pedro A. Hernandez Ubeda, c/Sainz de Baranda 44-3ºD. ES-28009 Madrid. esperanto@mi.madridtel.es

Italio : Giancarlo Rinaldo, via Savonarola, 65, IT-35137 Padova

Rusio : Popola Rusia E-o-movado (PREM), Nikolao Gudskov, p/k 57, RU-105318 Moskvo

Svedio : Sveda Laborista Esperanto-Asocio, p/a Pelle Persson, Svartvigsbg. 14, SE-123-52 Farsta

SAT-rondoj povas fondiĝi en diversaj urboj kie la SAT-anaro estas sufiĉe grava kaj ludi rolon kompareblan al tiu de la LEA-oj, ekzemple :

SAT-grupo de Sapporo (Japanio), Miyazawa Naoto, Asabu-tyo, 1-3-13, Kita-ku, Sapporo JP-001-0045 Japanio

Fakoj kaj Servoj de SAT plivastigas la eblecojn de la asocio kaj povas fondiĝi laŭ iniciato de membroj aŭ grupoj interkonsente kun la Plenum-Komitato : Solidarservo, Broŝurservo, Amikeca Reto, Filatela Servo, Junulfako.

Frakcioj. SAT ne estas politika partio, sed starigo de frakcioj estas ebla se troviĝas sufiĉe da interesatoj pri sama idearo kongrua kun la SAT-celoj : Liberecanoj, Distribua Ekonomio, Ekologiistoj, ISF-Socialistoj, Komunistoj, Liberpensuloj, Naturismo, Pacismo, Naturismo...

La Literatura Komitato de SAT lingve kontrolas verkojn.

Kunlaboranta asocio : Turista Asocio "La Naturamikoj" - Manfred Pils, Diefenbachgasse 36, AT-1150 Wien, Aŭstrio.

Eble por neniu en la mondo nia demokrata lingvo havas tian gravecon, kiel por la laboristoj, kaj mi esperas, ke pli aŭ malpli frue la laboristaro estos la plej forta apogo de nia afero. La laboristoj ne sole spertos la utilon de Esperanto, sed ili ankaŭ pli ol aliaj sentos la esencon kaj ideon de la esperantismo.

L.-L. Zamenhof (1910)



Albert Einstein akceptis en 1923 la prezidantecon de la tria SAT-kongreso en Kaselo, Germanio.

Portreto desegnita fare de Ludoviko Rodo (pseŭdonomo de Rodolphe), aktiva esperantisto kaj kvara filo de la fama pentristo Camille Pissarro.

“Al la partoprenantoj de la 43-a mondkongreso de la laboristaj esperantistoj mi sendas miajn korajn salutojn. Mi ĝojas, ke tiu ĉi kongreso en Aŭgsburgo kunigas multnombrajn gastojn el eŭropaj kaj ekstereŭropaj landoj. La celo de la paca interkompreniĝo trans mondkoncepton kaj limojn meritas la subtenon de ĉiuj spiritaj kaj politikaj fortoj “

Telegramo de la germana kanceliero Willy Brandt al la 43-a SAT-kongreso (Aŭgsburgo, 25-31/07/1970)

La plena sukceso de Esperanto dependas de la praktika, socia kaj kultura dimensio kiun ni havigos al ĝi.

Pliaj informoj kaj aliĝkondiĉoj estas riceveblaj de :

SAT
67, avenue Gambetta
75020 PARIS
Tel. +33(0)1 47 97 87 05
Telekopio : +33(0)1 47 97 71 90
Retadreso : <satesper@noos.fr>
<http://sat-esperanto.org>
aŭ de via peranto :

SENNACIECA

ASOCIO

TUTMONDA



**Ekzistokialo kaj specifeco
de la SAT-movado**

***SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia
sent-, pens-, kaj agadkapablo***

Kio estas SAT ?

Unika pro siaj celoj kaj strukturo, sia sistemo de funkciado kaj de komunikado, Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) alportas konkretan kaj praktikan respondon al ideo kiun esprimis la franca verkisto Henri Barbusse pri esperanto :

“Sincera dialogo inter du sinceraj homoj oficiale malamiko ĉar ili apartenas al du malsamaj nacioj fatale evidencigas la tutan socian mensogon. Tiel modesta ĝi aspektas, meze de la disvolvado de grandaj ideoj de frateco kaj de racio, la kontribuo de la internacia lingvo havas nekompereblan senperan kaj praktikan valoron.”

Tio klarigas kial SAT neniam havis la favoron de reĝimoj kies reĝprincipo baziĝas sur mensogo.

Unuvorte, SAT celas per konstanta uzado de raci elpensita lingvo kaj ĝia mondskala aplikado, helpaa al la kreado de racie pensantaj spiritoj, kapabla bone kompari, ĝuste kompreni kaj prijuĝi ideojn tezojn, tendencojn kaj sekve kapablaj elekti memstar la vojon, kiun ili opinias plej rekta, aŭ plej irebla po la liberigo de sia klaso kaj forkonduko de la homar, al kiel eble plej alta ŝtupo de civilizo kaj kulturo.

Eltiraĵo el la statuto de SAT

Kial SAT ?

Fondita en Prago en 1921, SAT naskiĝis en epoko kiam multaj sociaj kaj politikaj realaĵoj aperis sub vera lumo al la loĝantaroj de la diversaj nacioj enmiksitaj en la unua mondmilito.

Malgraŭ tio la historio de la totalismaj, naciistaj, ideologiaj kaj religiaj devojiĝoj ne haltis. La ekzistokialo de SAT aperas en sia tuta evidenteco dum la aktualaĵoj ebligas malkovri kien la mensmanipulado de amasoj kaj diversaj formoj de mensogo kondukas la homaron.

La mensogo havas tiom pli da efiko ke la kultura kaj kritika nivelo de la loĝantaro estas malalta.


La vivkondiĉoj kaj la ĉirkaŭa medio homa kaj ekologia estas por granda parto el la homaro tute malfavoraj al disvolvigo de la personeco, al riveliĝo de la homaj kapabloj, kaj eĉ al normala afekcia kaj fiziologia disvolvigo.

Ekzistas la sciencaj kaj teknikaj rimedoj, la riĉofontoj kaj produktaĵoj per kiuj estus eble alporti rimedon al multego da problemoj kaj certigi decan vivon al la tuta tera loĝantaro. Sed, ilia devojigo por egoistaj celoj estigas konstantan konfliktan klimaton.

La forigo de la minacoj kiuj pezas sur la estonteco de la homaro postulas antaŭ ĉio kreskantan strebon por konsciiga edukado sen kiu la totalitarismaj ideologioj kun efiko mortiga, detrua kaj ruiniga sed sen konstrua, organiza kaj vivodona kapablo trovos ĉiam fekundan teronon.

Kion faras SAT ?

Sennacieca, laŭ sistemo de funkciado, SAT dekomence adoptis ankaŭ sennaciecan, unikan laborlingvon, kies valoron agnoskis eminentuloj kaj internaciaj organizoj : Esperanto. Esperanto proponas mondskalan ligilon per kiu povas naskiĝi kaj disvolviĝi tutplaneda konscienco kaj sento de aparteno al tiu kompleksa homa mozaiko kies ĉiu aparta ero estas respektenda kaj harmonie valorigenda : la homaro.



7000 tagoj en Siberio

ekzemplo de verko eldonita fare de SAT.

Tiu ĉi reala travivaĵo en Gulago evidente ne havigis al SAT la simpaton de la koncernaj reĝimoj, sed ne nur ili disvastigis kalumniojn kontraŭ la SAT-movado kaj Esperanto.


Je bazo de la paragrafo de la ordono de la Ŝtatprezidanto por Defendo de la Popolo kaj Ŝtato de la 28 de februaro 1933 (RGI 1 S 83) per tio ĉi “der Nation-Losen-Weltbund der Esperantisten” (Sennacieca Asocio Tutmonda. Sidejo : Parizo XX) estas malpermesita.

(Sekvas ordono de konfisko de la havaĵo) Lajpcigo, 12.5.34. La policprezidentaro / Knofe

SAT celas praktikan mondskalan uzon de Esperanto por celoj de socia progreso kaj emancipado de la laboristaro.

Ĉar ĝiaj membroj aktivas ankaŭ en plej diversaj movadoj, SAT estas tiel la krucvojo kaj ligilo inter diverslandaj organizoj kies celoj estas similaj, komplementaj aŭ proksimaj sur la terenoj de edukado, sindikatismo, ekologio, libereco, homa interhelpo, pacdefendo, ktp, sed kies lingvo estas malsama.

La rolo de SAT en la sukceso de esperanto kompare al aliaj provoj viviĝi projektojn de planlingvoj estas eksterduba. Sen tiu ĉi strebo celanta havigi socian, kulturalan kaj praktikan dimension inter la partoprenantoj de la ĉiutaga socia vivo, esperanto estus spertinta saman sorton.



Inter la plej gravaj kontribuajoj de SAT al la disvastigo de Esperanto : la **Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto** — «PIV», eld. 2002 ĉi supre —, la plej kompleta E-vortaro kaj la sola tutmonde referenca.

Ĉiu SAT-membro ricevas ĉiun duan jaron la adresaron de la membroj de la asocio, kio ebligas havi rilatojn, interŝanĝojn, kontaktojn, prepari projektojn kaj vojaĝojn kun aliaj membroj kies intereso, aktivado kaj gustoj akordiĝas.

Kun membraro en pli ol 40 landoj de la kvin mond-partoj, SAT havas krome du servojn kun esence soci-kultura intereso : la «**SAT-broŝurservo**» por eldonado de broŝuroj kun tre varia enhavo, kaj la vojaĝservo «**Amikeca Reto**» : <<http://www.creaweb.fr/a.reto>>.

SAT eldonas du periodaĵojn :

Sennaciulo, kaj

Sennacieca Revuo.

Sennaciulo aperas dek-unu fojojn jare kun kontribuajoj verkitaj de membroj, (ne nur)

kaj la socikultura kajero **Sennacieca Revuo**, unu fojon jare kun artikoloj verkitaj de Esperantistoj ne nur el la SAT-movado kaj aparte kompetentaj rilate al Esperanto kaj al sia fako.

Sennaciulo

Porto Alegre
Monda Sociala Forumo

8a de Marto
internacia
virina
tago



VALORU LA TIRON DE FRATERNESIMO SEN-PENSAJ DISKUTOJ DE SAT